

& La reviviĝo:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 430 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Per espero al despero, Pardubice 1910). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Unua koncerto.>

(#Melodio:

(/MiMi MiFa FaMi MiLa Lado; mimi mifa fami mido doTi; MiMi MiFa FaMi MiSi SiTi; rere refa fami mido Ti La;

(#Rekantaĵe: Mi MiFa FaMi MiLa Lado; mi mifa fami mido doTi; Mi MiFa FaMi MiSi SiTi; re refa fami mido Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Mi jam estis sen la idealoj, ; ne ekzistis por mi jam la floro, ; eksekiĝis amo en la koro, ; min ne tuŝis kant' de najtingaloj.

(×: **Memoru kion kanto diras ; dum vi en danco paŝe spiras. ; Metu la vorton en memoron ; kaj ĝin akceptu en la koron.**)

'2 Mi nur vidis rapidantan sorton, ; nokton seneliro kaj sen fino, ; la fantomon, kun la kurba spino - ; insideme proksimantan morton.

'3 Mi ne ploris, mi ne ĝojis plue, ; mi nur kantis unu melodion, ; ke la sorto tiunkomedion ; kun mi finu, kiel eble frue.

'4 Sed subite, kiel el la dormo ; mi vekigis tute elŝanĝita ; kaj la mondo demi forlasita ; aperis al mi en nova formo!

'5 Granda suno brilis sur lazuro; kaj vastiĝis ĉie lum' kaj varmo ; kaj en

branĉoj kant' de l' birda svarmo ; sonis kiel ia uverturo.

'6 Tuj mi sentis, kiel stranga flamo ; disverŝiĝas en la pala vango ; kaj en mia koro densa sango ; brulis kiel iam dum la amo.

'7 Odorplena spiris la aero ; kaj el ĉiu plej kaŝita niĉo ; ekridetis al mi la feliĉo, ; nova vivo, plena je espero.

'8 Dankon al vi, stranga verda stelo, ; kiu en la nokto sen espero ; el putranta, ŝima atmosfero ; ekaperis hele sur ĉielo.

'9 Dankon al vi, kiu en krepusko ; ekbriletris al mi, foriranto, ; kiel precioza diamanto, ; kiel luma muŝo en la musko.

'10 Nur mi tremas, ke la juna floro ; ne sekiĝu al mi en la mano ; kaj ne dronu en la oceano ; mia stelo, kiel meteoro.)